


Hispana Esperantista Junulara Societo (H.E.J.S.)

JUNULARA SEKCIO DE H. E. F. - LANDA SEKCIO DE T. E. J. O.



ОБИЧАМЕ
ВУ!...

Dontxo
kaj Vera

Al la legantoj de
HEJS-Juneco -
kun bondeziraĵoj
por sukcesoj!
Aŭtitar
Barcelona,
19.09.87

NUMERO 132
(NOV. - DEC.)

En ĉi-numero:

- .Demarŝoj pri Monistrol
- .Esp-aj aragon-parolantoj
- .Kursoj en Baskio
- .Agado en Andaluzio
- .Rilatoj KEJ-HEJS
- .Informejo en Sant Cugat
- .Informoj el Portugalio
- .Statistikoj
- .Pri ikso en esperanto
- .Estraraj informoj
- .Humoraĵoj.

HEJS-JUNECO

Red. Jesuo Armengol

Kunlaboris: Nuri Martínez
Anna Pedrola, Ĉema
Rodríguez, Joan Felip
Antero, Natxo Apaolaza
kaj João Santos.

Eldonkvanto: 300 ekz.

HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

Centra Oficejo:

Sol, 75.
41003-SEVILLA
Andaluzio
Tfno. (954) 415991

HEJS

Madrida Oficejo ĉe

Madrida Esperanto Junularo

Barcelona Oficejo ĉe

Atomo

revuoj

Hejs-Juneco

Jesuo Armengol i Arbiol
Francesc Moragas, 95. 3-2
08922-STA COLOMA DE GRAMENET
Katalunio
Tfno. (93) 3865533

La Mano

Jorge Camacho Cordón
Chantada, 43. 1-3
28035-MADRID
Madrido
Tfno. (91) 7395652

KATALUNIO

Atomo
Carreras Candi, 34-36
08028-BARCELONA

Sankta Kolomba E-o Grupo
Sant Josep, 20
08922-STA COLOMA DE GRAMENET

Komitatano: Jesuo Armengol i
Arbiol

ARAGONO

Junulara E-ista Societo Aragona
Apdo. 149
50080-ZARAGOZA

Komitatano: Juan C. Nuño Casión

MADRIDO

Madrida Esperanto Junularo
Atocha, 98.49
28012-MADRID

Komitatano: Jorge Camacho Cordón

ANDALUZIO

Andaluzia Esperanto Junularo
Apdo. 611
14080-CORDOBA

Komitatanoj:

Ricardo F. Albert Reyna
Esther Morillas García

jen ni

Finiĝas la jaro, la jubilea jaro. Laŭ mia vidpunkto Hejs relative bone k glate aktivadis. Tamen, mi antaŭvidas por 1988 interesajn pozitivajn okazaĵojn en nia junulara movado pri kiuj mi esperas raporti en ĉi revuo. Nu, por vera sukceso, ni ĉiuj pli interesiĝu k zorgu pri nia movado.

Ĉi-numera frontpaĝo aperigas saluton de Donĉo Ĥitrov (ĉefredaktoro de Bulgara Esperantisto) kaj edzino. Li tre afable ĝin subskribis okaze de sia restado en Barcelono, antaŭ nelonge. El tiu vizito ekestis bonaj proponoj pri rilatoj inter redaktoroj. En tiu desegnaĵo vi povas rimarki lian nomon bulgare АОНУО.

Nu, miaj karaĵ, mi deziras al la legantoj de Hejs-Juneco ĉion bonan en 1988.

Agrablan tralegdon.

Monistrol de Montserrat

12a HEJS * Tendaro

Demarŝoj por la 12a Hejs-tendaro en Monistrol de Montserrat, eble lante, sed bone antaŭeniras.

La organiza komitato prezentis dosieron antaŭ Generalitat de Catalunya. Tre aŭfable la komitato estis akceptata far Francesc Xavier Balaguer, ĉefo pri Teritoriaj Servoj al la Junularo. Li informis k konsilis kiamaniere agi por atingi subvencion de Generalitat, montrante intereson al la evento. Nura problemeto por la organizantoj estas decidi pere de kiu oficiala junulara organizo peti la subvencion. Ĉiumaniere oni devas atendi ĝis la komenco de la jaro por adaptiĝi al la nova regularo.

En la Diputació de Barcelona la komitaton akceptis Miquel Salazar, ĉefo pri Kulturaj Aferoj. Tamen por ĉi departamento oni devas refari dosieron detalanta specifajn elspezojn. Post la interparolo, preskaŭ certas ke el Diputació oni havos parton de la materialo bezonota.



En la foto aperas Joan Felip k Jesuo, babilante kun la Urbestro de Monistrol.

Tamen, la plej grava intervidiĝo okazis kun la Urbestro de Monistrol. Almenaŭ en unua kontakto oni konsentis pri tendarloko kaj eventuale pri restadejo, pri duŝejoj, pri propagando kaj de Monistrol kaj de la tendaro, pri festejo kaj pri manĝado. Ankorauŭ mankas decidi pri kunvenejo. Laŭ unuaj impresoj, al la urbestro plaĉegas la ideo de tendaro en Monistrol. Venontaj intervjuoj okazos kun Aïna Moll, ĉefo pri lingvistika agado de Generalitat, kaj kun direktoroj de oficejoj de Sparkasoj en Monistrol.

TRE GRAVAS ke, se vi jam decidis partopreni, sendu vian aliĝilon, proksimume, kiom da personoj venos. Ne necesas ke vi pagu la kotizon aŭ la DONACON (kiun oni esperas grava), tion vi povos fari je via alveno.

Instruantoj informu viajn gelernantojn k instigu ilin partopreni.

Informoj k aliĝiloj ĉe:

Jesuo Armengol i Arbiol

Francesc Moragas, 95. 3-2

08922-Sta. Coloma Gramenet

Catalunya



-Cu vi venas miahejmen sondiskojn audi?

-Nur sondiskojn audi.

-Nu, bone.

-Kaj se mi ne satas ilin?

-Tiam vi revestiĝas kaj eliras.

Normaliza-te: Charra n'aragonés y N' ESPERANTO!

En la pasinta kongreso de KEA (Kataluna Esperanto Asocio) mi parolis kun "aragonesofablans" (aragonparolantoj). La plej multaj el vi certe pensas ke, la aragona estas mortinta lingvo aŭ dialekto el la kastilia. Do ne, la aragona estas lingvo viva, kiel esperanto. Oni eldonas revuojn, laŭ ĉies gustoj: ...magazinoj, inkluzive junaj fanzinoj kiel "O Follet" (la Nano). Esperantnivele, aragonanoj ankoraŭ bezonas kreski iomete, pli ol nun, sed uloj kiel Chabier ja volas krei esperantan grupon jen en la tuta Aragono, jen nur en Binéfar.

Mi sciigis ke, ene de la Consello d'a Fabla Aragonesa troviĝas pluraj simpatiantoj al esperanto.

Sendube en Aragono povas okazi same kiel en Basklando. Ke estu tiel, mi deziras bonŝancon kaj sanon al la estonteco de tiu ĉi movado, tiel poraragona, kiel poresperanta. Vi jam scias samideanoj, se vi volas aŭ bezonas kontakti pri e-o skribu:

Joan Felip Artero

Charra-me n'aragonés



**Consello d'a
Fabla Aragonesa**

Laŭ informoj alvenintaj el Baskio mi eksciis pri sukcesa kurso en Gasteizo. Fininte la unuan parton, oni nun komencos la duan. Almenaŭ 20 gejunuloj restas en la kurso gvidata far Natxo Apaolaza.

Intervjuoj en radio kaj aperigo de artikolon en ĵurnalo estas la lastaj sukcesoj de la Alava E-O Asocio.

Ŝajne nun en Baskio okazas same kiel en Andaluzio antaŭ 2-3 jaroj: tre forta naskiĝo de junulara movado. Ĉu venontjare tio okazos en Galegio?



Rekta metodo. Por multaj personoj la plej bona maniero lerni esperanton.

Chabier Tomás Arias

Travesia de Sabadell, 2. 2-D

22500-Binéfar

Uesca-Aragón

kaj pri aragonaj aferoj:

Consello d'a Fabla Aragonesa


Trestallo Postal 147

22080- Uesca

Aragon

LAŬ FELIP '97 (preskaŭ '88)

2




KAMARADO
JOZEFĈJO, EBLE
ME. SĜATIS LA E-O
IDEON ĈAR LI ESTIS
IOMETE HUNDETO.
VIDU DO TIU FOTO
KAD AŬDU AL LA
HUNDOJ KIUT BODAS:



STALIN, STALIN!

E-O?
KIO?
ESTAS?



(MIA ONKLO EL LA URBETO,
HIERAŬ JE LA OKA)

5

Ĉu en la venonta numero aperos la
pripensou de la propra Aŭtoro?
... Aŭ de la prezidanto el Esperantujo?
Bone, kion mi scias estas ke mi dediĉas tion
historieton al la e-o movado el Baszklando, kaj
tre speciale al la galemlingvoj de Natxo Apapalaza.
Al ili kaj al mi: *[Signature]*

1



LA ĈEFA KIALO AL
LA APOGO POR
ESPERANTO DE
MAO DE DONG,
ESTIS SENDUBE
LIA PROpra NOMO.
MAO, KAD NE GUAV.
AL MAO PLIĜIS MULTE
NI, LA KATOD. GRANDA
VL. SINDOROT



FEK! ALLA
PATRINO KIN
MASKIS TIUJN
ESPERANTISTOJN!



* Johan Martin
Schleyer, 1887,
Kreinto de l'
Volapük.

ĈU EKZEMPLE
KIAMANIĜE OKUPI
SPACON

... SED ... ĈU VI SCIAS
KIAL ERASMO DE
ROTTERDAMO PIRIS
NENION PRI E-O?
(STULTA DEMANDO)
ĈAR E-O APERIS
EN 1887 KAD
ERASMO MORTIS
EN 1536 ... HE, HE
(STULTA RESPONDO)



... Se iu motigigas unun alian ...
tiu estas maldulo.
Se iu motigigas mil ...
... tiu estas heroo!

E. de Rotterdam



MI DEZIRAS AL ĈIUJ
VI, ENE DE TIU ĈI
KRISTNASKOJ!

SANNO!

ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO

Junulara Sekcio de AEU
Federaciiginta Organizo al HEJS



* * * * *

La celoj de AĖJ estas kunigi ĉiujn andaluziajn gejunulojn kiuj parolas aŭ simpatias al internacia lingvo, intencante perfektigi la lingvan nivelon de la junularo en Andaluzio kaj partopreni en la junulara E-movado, Kunvenoj de AĖJ okazos kadre de ĉiu Andaluzia E-Kongreso, ankaŭ oni celas organizi komunajn ekskursojn al belaj lokoj de Andaluzio (Donjano, Kazorlo, Granado, ktp...) kaj faciligi per subvencioj la ĉeeston de la andaluziaj gejunuloj al la junularaj kongresoj.

Eble troas la celoj kaj malabundas la mon-rimedoĵ, pro tio por 1988 ni petos subvencion al la Andaluzia Registaro. Entute AĖJ havas 23 membroj, kvankam antaŭ ol la jarfino espereble ni estos 30. Sciu ke estas grupetoj da junaj gesamideanoj en Seviljo, Malago, Kordovo, Granado, Jerezo k Torokso, kaj izolitaj gejunuloj en multaj urboj kaj vilaĝoj de nia lando.

Ni volus profiti ĉi paĝon en Hejs-June-co por montri al vi niajn agadojn, dezirante ĉi-numere multajn sukcesojn al ĉiuj junularaj E-grupoj de Hispanio. Ni dezirus ekkontakti kun katalunoj, madridanoj, baskoj, valencianoj, aragonanoj, galegoj k ĉiuj organizitaj junularaj E-grupoj en Hispanio.



Jen foto kie aperas junaj ĉeestantoj al 5-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO ĵus okazita en TOROKS' (Malago).

Maldekstre-Dekstren

STARAS: JESUS (Toroks') - PAQUI (Malago) - JESUS (Malago)
RICARDO F. (Madrid/Malago) - ALBERTO (Seviljo) -
JOSE IGNACIO (Granado) - FRANCISCO JAVIER (Malago)
KAŬRAS: JAVIER (Malago) - JULIO (Malago) - ESTHER (Malago)
JESUD (Sta. Coloma, Barcelono) - ĈEMA (Kordovo).

Plezure ni sendos nian revuon - Gazeto Andaluzia - kie aperas junularaj paĝoj (informoj k komikso) kontraŭ viaj revuoj.

Nia adreso estas:

Andaluzia Esperanto Junularo

Apdo. 611

14080-Cordoba

Andaluzio

* * * * *

-Oni malkovris maldekstrulan politikiston kun kvar paĝoj en la nuklo.

-Kaj kion opinias la registaro ?

-Ke tio estis memmortigo.

Advokato: per mia agado ili perdonas al vi du el la tri mortokondemnoj.

rilatoj HEJS - KEJ

La 5an de decembro okazis konstitua asembleo de nova Kataluna E-o junularo kiu jam ne plu agados kiel junulara sekcio de KEA (Kataluna E-o Asocio). Pri la enhavo de la Asembleo oni publikigos raporton (mi supozas) en la revuo Kata Luno -oficiala organo de KEJ - .

Ĉi tie mi raportos pri propono de rilatoj inter HEJS-KEJ, kio povus ebligi definitivan solvon al nekomunikeco de la du junularaj organizoj.

HEJS-membroj en Katalunio bezonas organiziĝi por bone agadi kaj esti je la sama nivelo ol alilandaj federaciigitaj asocioj (AEJ, MEJ, JESA...) por kontribui al la definitiva konstruo de la kunfederaciiga strukturo de HEJS.

De antaŭ tempo Hejs proponis (laŭ statuto) al Kej ties federaciigo. Tamen Kej malkonsentis, decido plene akceptita de Hejs (ekz. voĉdonante "sindetene" en TEJO pri landsekcio de Kej al tiu organizo).


Unu ebleco por ke kataluna e-o junulara movado estu reprezentita en Hejs, estis krei novan organizon alternativan por tiuj personoj, kiuj ne simpatias al la agado de Kej. Eĉ pri tio oni jam demarŝis, sed kontraŭvole, ĉar oni konsideris ke dividi e-o movadon en iu ajn lando ja estas malbone. Alia ebleco estis membriĝo al Kej, kaj en Kej krei sekcion de tiuj personoj membroj samtempe de Hejs. Ĉi sekcio de Kej estus la federaciiginta asocio al Hejs en Katalunio.

Ĝi, kun ambaŭ organizoj. Ĉi ebleco estus bona por KEJ (pli da membroj kaj aktivaĵoj), por Hejs (pli da membroj, malfermo de kataluna movado, organiziĝo de siaj reprezentantoj en Katalunio).

Ĉi lasta ebleco estis prezentita antaŭ la konstitua asembleo de KEJ. Principe la propono estis bone akceptata, sed ĉe iuj personoj mi konstatis malkonsenton pri federaciigo de tiu sekcio al HEJS.

Kreado de tiu grupo NENJEL signifas rektan ligilon de ambaŭ asocioj. Al ili nur ligiĝas la membroj de la grupo. Se paroli pri politiko neniel signifas akcepton de Hispanio kiel landon. Pri tio ĉiu membro persone havos sian privatan opinionon.

Tamen ĉio estas decidota. Nin interesus ricevi opinionon de hispanaj kaj katalunaj esperantistoj pri la afero. Sendu al la redakcio de Hejs-Juneco viajn reagojn. Pri rezultatoj de la konversacioj oni raportos en venonta numero.



SANT CUGAT

La 15an de novembro la e-o grupo Jozefo Anglés de Sant Cugat del Vallès aranĝis informojn pri esperanto kadre de la "Festa de la Tardor" (laŭtuna festo) kie ĉiu kultura organizaĵo de Sant Cugat partoprenas. Multaj personoj interesiĝis, eĉ la Urbestro mem. Per la laŭtparoliloj instalitaj oni povis aŭskulti la rokon de Amplifiki. Kaj amuze estis ke grupeto da maljunaj personoj elirinte el la preĝejo apuda kaj ekaŭdante tiun muzikon komencis danci eĉ pli bone ol multaj junuloj, kio amuzigis ĉiujn.

La festo finiĝis per komuna tagmanĝo de la esperantistoj ĉe Trini, gvidantino de la grupo.



HA, HA, HA!
HE, HE
HE!

HEJS-JUNECO KONKURSO SPRITAĴOJ

Natxo Apaolaza estas la gajninto de la konkurso pri spritaĵoj. Nur li partoprenis, do li rajtas je la du premioj:

- Jarkotizo Hejs 1988, kun ricevo de Hejs-Juneco kaj La Mano
- Abono al la internacia revuo Kontakto
- La spritaĵoj aperados en Hejs-Juneco.





-mia generalo, vi havas ŝeketon en la kapo.

-Kiel? Aliaĵo malfermiĝis mia vundo.

Portugaliao

Mia promeso estas plenumita. El Portugaliao min atingis informoj pri sukcesa aktivado. Johano Santos starigis mezgradan kurson en PEA (Portugala Esperanto Asocio) en Lisbono. La daŭro estos unu lernojaro kaj la celo, formi instruistojn de esperanto en Lisbono. Tamen, ankaŭ indas je rimarko: 1 elementa kurso far Johano, 2 elementaj far Gonçalo, kaj aliaj starigitaj en aliaj lokoj. Laŭ informoj ricevitaj PEA svarmas ĉiusabate. Ĉi apude oni aperigas desegnaĵojn de Snupi sendita de Johano.



Desegnis: Fanjo
Esperantigis: Joĉjo
1987

STATISTIKOJ

En la Jarfino Hejs rememorigas al ĉiuj la neceson pagi la kotizon de Hejs 1988 por ke la organizo daŭre funkcii kaj aktivadu. Ankaŭ gravas la helpo de la protektantoj. Oni devos noti ekde nun ke, nunaj leĝoj en nia lando konsideras ke membroj de junularaj organizoj estas ĝis la aĝo 30 anstataŭ 26 kiel ĝis nun.

Por ke vi iom pli konu Hejs, jen kelkaj statistikoj:

%	im	prok
Kantabrio	█	13'3
Andaluzio	20'3	█
Ekstremaduro	3'3	█
Katalunio	28'3	33'3
Valencio	13'5	6'6
Rioĥo	1'6	█
Murcio	6'7	█
Madrido	8'4	6'6
Aragono	5	13'3
Asturio	1'6	█
Galegio	1'6	█
Balearoj	█	█
Baskio	5	█
Kanarioj	█	█
Navaro	█	6'6
Kastilio-Leono	█	█
Kastilio-Manĉo	1'6	█



far joan felip

Ĉiuj ni scias ke la X (iks) estas nebla litero en nia lingvo. Nu, mi ne pensas tiel.

La litero X (ks) estas malnova litero, de antaŭ la greka epoko. La plej multaj lingvoj hodiaŭ utiligas ĝin, kvamkam kun diversaj sonoj kiel (s) aŭ (s). En E-o oni havas du literojn ("k" kaj "s") por peri ĝin. Kial oni ne havas "t" kaj "s" por peri la sonon (c)?

Oni diris al mi ke inter la fonetikuloj estas iuj kiuj asertas ke (c) estas unu sono, sed ke, (ks) estas du.

Tio valoras neniom laŭ mi. Certe mi ne estas fonetikisto, sed kvamkam tio mi havas du orelojn (tro grandaj malfortune). Se antaŭ scii esperanton oni dirus al mi (celo)-n mi skribus kun bona volo "tcelo". Ŝanĝe, se oni dirus al mi (Meksikio) mi skribus "Mexikio", kiel devas esti.

29 literoj? Jes, kial ne. Pro pia litero oni ne lasus la studon Eble oni povus meti tiun kaj forigi la "ĥ", kiu iom post iom estas malaperante.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Kiel vi certe jam scias, nian asocion konsistigas individuaj membroj (JM), kaj protektantoj (PROK). La unuaj, ĉefa bazo de nia asocio, estas tiuj membroj de HEF malpliagaj el 30.. Se vi troviĝas sub aĝo kaj deziras membriĝi al nia asocio, vi bezonas nur aliĝi al HEF kaj rekte ekeriros nian rondon. Se vi troviĝas super tiu aĝo kaj tamen deziras eniri en HEJS vi povas tion fari per la PROK-vojo. Pri ambaŭ manieroj aliĝi vi povas peti informojn de nia Centra Oficejo.

Tamen, lastatempe aperis nova membrokategorio, pri kies eco neceso cerbumi. Temas pri tiuj membroj de niaj federaciigitaj asocioj kiujn la artikolo 8.2 de nia statuto nomas Federaciigitaj Membroj (FM) sed kies kategoriĝon oni ne difinis komplete ĝis nun. Tiu temo devos esti profunde traktata en nia Federacia Kunveno, kiu unufoje okazos en la venonta Monistrola Tendaro. Antaŭ tiu afero prezentiĝas du eblaj demandoj: se nia asocio estos iam vera federacio, ĉu la JM devos malaperi ĉar malkongruaj kun federacia sistemo? Tiu afero devos solviĝi iom post iom. Sed momente ni devas pluteni tiun kategoriĝon kiel provizore funkciantan ĝis HEJS konsistigos federacian organizon. Ni tamen devas jam komenci pripensi, kiajn rajtojn kaj kian trakton oni oferu nun al tiuj FM jam ekzistantaj. Por komenci kalkuli pri tiu afero, nia CO urĝe bezonas liston de membroj de ĉiuj FA (ĝis nun ni posedas nur el AEG kaj MEG). Tiun peton ni realigis anataŭlonge sed evidentigis nerespondo.

Principe oni povus pripensi la eblecon sendi ankau al ili HEJS-JUNECON kaj rajtigi ilin al rabatoj en niaj renkontiĝoj. Krome la CO ricevis ĝis nun nur du federaciajn kotizojn (MEJ kaj ATOMO -por 1986-). Se oni volas kontraŭstari la kotizsistemon oni proponu en la venonta Tendaro. Sed dum ĝi validas, bonvolu ĝin plenumi.

Lastatempe la estraro pensis kromkategorigi tiujn membrojn, kiuj montras sin aktivaj per la etiketo "aktivuloj" (akt) -ĉu JM, ĉu PROK aŭ FM. Per AKT oni komprenas, ke tiu membro regule kunlaboros niajn publikaĵojn (HEJS-JUNECO kaj La Mano), ĉeestos niajn kunvenojn, ĝenerale interesiĝos pri la funkciado de nia asocio kaj teorie pretus posteniĝi en la estraro senecese. Al tiuj uloj oni kromsendas la revuojn KONTAKTO kaj TEJO-TUTMONDE kaj la informajn cirkulerojn. Ŝulde al tio, ke niaj tiurevuaj stokoj sufiĉe maldikas -precipe pro tio, ke nia ekonomia situacio ne permesas aboni ilin per plialta ekzemplerkvanto -ni devis nepre selekti "al kiu sendi". Ni esperas, ke vi komprenas nian sintenon.

Do la membropanoramo rilate revuricevadoj jene restas:

JM ricevas HEJS JUNECO, BOLETIN kaj LA MANO.

PROK nur HEJS JUNECO

FM ankoraŭ difinenda kategorio

AKT Sendenpende de la kategorio al kiu ili apartenas, ili kromricevas la revuojn KONTAKTO, kaj TEJO TUTMONDE kaj niajn cirkulerojn.

AKT devos sin anonci al la CO. Ni krome atendas proponojn por la difino de FM (prefere el ili mem) kaj nepre bezonas ties listojn far la FA. Ni deziras scii la definitivajn sintenojn rilate federaciigon el VEJA kaj la Alava Esperanto Asocio. Kzistas asocioj, kiuj interesigas pri federaciigo al HEJS, ne hezitu

informiĝi pri tiu nova sistemo adresante al nia CO.

Pripensu pri ĉio dirita. Ne hezitu kontakti nin por proponi, aktivuliĝi, respondi al niaj petoj kaj tiel plu.


estrarajn vangokisojn al ĉiuj!
Prezidanto de HEJS

NACIA LOTERIO ★ KRISTNASKA LOTADO

N-ro 10.385

80 pesetoj

Donaco 20 pesetoj



La portanto de tiu ĉi bileto ludas la kvanton de okdek pesetoj je la supre indikita numero de la Lotado okazonta en Madrido la 22an de Decembro de 1987.

Ne valida post tri monatoj - Ĝirita aŭ riparita ne validas

La Deponevento: **Hispana Esperanto Federacio** ★

Carreras Landi, 34
08028 BARCELONA

Ĉaze la ĝi estos premiita, oni pagos ĝe «Caixa d'Estalvis de Manresa» of. 023 - Manresa

Condimentos **SANCAN**

10161, 87919 05 - MANRESA

Fabricación de condimentos y aditivos para las industrias cárnicas.

Ludata far HEJS-JUNECO


tutmonda esperantista junulara organizo

tejo-
TUTMONDE
oficiala gazeto de tejo dumonata

ABONU "TEJO-TUTMONDE"

Oficiala gazeto de TEJO
Informas - anoncas
Raportas - rakontas
Opinias - kritikis
Kuraĝas - kuraĝigas
Instigas - edukas

TT evoluis al unu el
la plej bonaj gazetoj
en esperantujo. Tial
TT abonindas por 15 NLG
al la CO de UEA.



Ajuntament de Santa Coloma de Gramenet
Àrea d'Educació i Cultura